



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 2(70)

Aprilo 1970

Nova Kurso

Lewis Cook, 328 East Main St., Circleville, Ohio 43113, komencis instrui Esperanton en marto ĉe la YMCA de sia urbo.

Oratoraj Konkursaj Temoj

Dum la venontaj Landaj Kongresoj oni okazigu oratorajn konkursojn kun la temoj kiel tiuj antaŭviditaj en Vieno. Oni anoncis ke la temoj estas: 1. Sistemoj, 2. Ĉu antagonismo inter lerneja kaj eksterlerneja edukigo?, 3. Aŭtoritatismo, demokratio aŭ anarkio en lernejoj?, 4. Ĉu la lernejoj edukas la junularon por la estonteco?, 5. Kion volas nia generacio? La gegajntoj partoprenos en la internacia kongresa konkurso.

Statistikoj de UEA

Laŭ januara anonco de s-ro Ivo Lapenna, je la fino de decembro 1969, UEA havis entute 33,407 membrojn kompare kun 31,948 fine de decembro 1968. Krome, estis 124 simplaj abonoj, do entute 33,531 pagintoj. Finaj cifroj por 1969 estos poste konataj. Oni petas ke ni streĉu niajn fortojn por ke en 1970 UEA faru pluan paŝon antaŭen.

Gratulojn al Juna Esperantisto

Denis LeCam, kiu senerare redaktis esperantan junularan gazeton la 2an de februaro, 1970, estis ankaŭ "Studanto de la Semajno" en El Cerrito (Cal.) Altlernejo, kie li nun studas en sia lasta jaro.

Peto de Dekjara Knabino

Esther Gunkel, 6401 Zirkenbach 85, Okcident-Germanujo, kiu en decembro, 1969, sendis leteron pri Esperanto kaj paco al registrarprezidento doktoro Gustav Heinemann, kaj ricevis responde foton kaj aŭtografon, petas vin ke vi publikigu tiun fakton en viaj lokaj gazetoj kaj poste sendu al ŝi la eltranĉaĵojn por uzi en la pruvo ke dekjara knabino per Esperanto povas informi la tutan mondon "same kiel politikisto."

Anonco por Aŭtomobilveturigistoj

La nova reprezentanto por nia lando, de la Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista, estas Conrad Fisher, RFD #1, Meadville, Pa. 16335. Li petas ke ĉiuj samideanoj, kiuj posedas aŭ veturigas aŭtomobilo(j)n, aliĝu al la Aŭto-Klubo. La unufoje pagota kotizo estas nur \$1.25 (poŝtmarkoj neuzitaj akcepteblaj). Pli da informoj haveblaj ĉe s-ano Fisher. Bonvolu sendi 6-cendan poŝtmarkon por la afranko.

Internaciaj Pupteatroj

La tria internacia Pupteatro okazos en Zagreb, Jugoslavio, 5a - 11a, oktobro, 1970. Ankaŭ naŭ profesiaj pupteatroj en Ĉeĥoslovakio, Pollando, Rumanujo, Francujo, Anglujo, Sovetunio, Portugalujo, Gano, kaj Jugoslavio prezentos teatraĵojn en Esperanto aŭspicie de kelkaj organizoj inkluzive la Unuiĝo Internacia de Marionetistoj.

ELNA-BULTENO

REDAKTOROJ: Donald Munro
Rodney Ring

ADRESO: ELNA-Bulteno
Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

Sukcesa ELNA Kongreso Plibonigos la Internacian Kongreson en 1972

Prepare al 1972 en Portland kaj San Francisco NEPRE VENU al la ELNA Kongreso en julio, ĉar nur granda manifestacio antaŭ la televidaj kaj ĵurnalaj publikigistoj konvinkos la instancojn pri la eblecoj kaj grava signifo de Esperanto.

Roy kaj Dorothy Holland Transloĝigas

Roy, antaŭa prezidanto, kaj Dorothy, la nuna sekretariino de USEI (Usona Societo de Esperantistaj Instruistoj) Holland estas transloĝintaj de Fayetteville, Arkansas, al 1010 Crestwood Place, Santa Barbara, Cal.93105.

Helmuth Familio en La Jolla Novaĵo

Freŝdata eldono de "La Jolla Light" prezentis artikolon pri Esperanto, kiu resumas la progreson de nia lingvo kaj priskribas kelkajn interesplenajn personojn en la movado, inkluzive la Helmuth familio. Kaj Francis, nia prezidanto, kaj Bonnie, lia agema edzino, flue parolas Esperanton. Ilia 11 jara filino, Lisa, estas denaska esperantistino.

Por Vizitantoj al Japanujo

Antaŭvidante ke vizitos Japanujon sufiĉe multaj esperantistoj el diversaj landoj okaze de la Monda Ekspozicio en Osaka, kaj je aliaj motivoj, kaj samtempe supozante ke multaj el ili ŝatus kontakti esperantistojn, Japana Esperanto-Instituto (JEI) faris enketon pri la japanaj esperantistoj, kiuj pretas akcepti eksterlandajn samideanojn en siaj lokoj, kaj kolektis dekojn da respondoj el diversaj partoj de la lando. JEI, do, konsilas al tiuj gesamideanoj, kiuj intencas viziti Japanujon en proksima estonteco, ke ili petu la informon de la suba adreso koncerne al la eblecoj de esperantistaj kontaktoj kune kun loĝado, menciante kiel eble detale sian personan dokumenton kaj diversajn dezirojn dum la restado en la lando. La informpeto, tamen, devus atingi nin minimume antaŭ du monatoj ol la petinto forlasos sian landon. Ĉiu petanto aldonu tri internaciajn respondkuponojn. Adreso: Internacia Fako, Japana Esperanto-Instituto, TOKIO-Hongo 2-2-14, Japan.

Yoshimi Umeda, Sekretario
Internacia Fako de JEI

La Homo ne Vivas Sole Per la Pano

Anoj de la 4a Internacia Kongreso pri Grenoj kaj Pano, antaŭnelonge okazinta en Vieno, ne povis bone kompreni unu la aliajn malgraŭ 4-lingva samtempa interpretado, laŭ la usona delegito, d-ro L. P. Zeleny. "La kvalito de la interpretoj estis ĝenerale nur meza, perdigante al la aŭskultantoj multajn detalojn", li raportis. "La plej granda utilo ĉe la kunveno venis de privataj diskutoj, sed ankaŭ tie estis ofte tre seriozaj la malfaciloj lingvaj. La bezono pri internacia lingvo tutmonde parolota, komprenota, kaj legota de ĉiuj edukitoj estas ege granda. La manko de tia lingvo estas severa obstaklo kontraŭ internacia kompreno kaj internacia interkonsento pri iu ajn temo", konkludis la delegito.

* * * * *

NI KORESPONDU

Instruistino, 24 jara, S-ino Iva Stolinova. Na Strouze 1742, ĈESKA TREBOVA, okres Usti nad Orlici, Ĉeĥoslovakio. Intereso: literaturo moderna muziko, fotografio, antikvaĵoj, kaj bildkarta interŝanĝado.

Rumanino, Blaga Liviu. Cornului No. 28, Sonicuta - Mare, Jud Maramures. Romania. Volas interŝanĝi kolorajn bildkartojn, poŝtmarkojn, insignojn, monon, kaj revuojn.

Kuracista diplomitino, S-ino, D-rino Florentyna Renatte Audescu. Poŝt-restanta, Covasna, Rumania. 28 jara, bona komencantino. Interesiĝas pri pentrado, grafio, skulptarto, filmoj, verkoj, poetoj, ĵurnalistoj, raportistoj, popularo ktp.

Franca, ŝtata oficisto, Jean Poisson. 38 Avenue Condoret, Athis-Mons, France

Bulgara F-ino, Plamenka Vankova. Str. G. Genov 6U Varna, Bulgaria. Deziras korespondi kun usonaj gejunuloj.

Argentinano, Alberto, Luis Passaglia. La Plata B, 64-1739, Argentina.

Brazilano, 22 jara, Jorge Fernandez. Rua São Miguel, 211 Apt. C-01. Tijuca, Rio De Janeiro, Brazil. Interesiĝas pri turismo, vojaĝoj, kino, junula muziko, sporto, kaj poŝtkartoj.

ARTIKOLOJ

KAMPARA RAKONTO

Unu someran tagon mi kuŝis feliĉe en la sunbrilo en la farmdomkorto preskaŭ dormanta kiam mia kara edzino ekanoncis al mi ke ĉiuj terkulturistoj en la ĉirkaŭaĵo jam ĉirkaŭbaris siajn farmdomojn. Ŝi insistis ke mi vekiĝu kaj konstruu palisaron. Mi estas mallaborema, sed promesis pri-pensi la aferon.

Tiam mi decidis ke estas okazo por provi teorion kiun mi ofte konsideris en la meditempoj de la varmaj someraj posttagmezoj: Laŭ ĉi tiu teorio mi imagis grandan linion tra la terglobo, de mia farmbiendomo en Usono al la kontraŭpunkto de la globo en la sudokcidentparto de Aŭstralio. Mi tiam lernis ion pri tiu distrikto per helpo de vojaĝagento, registraroficisto, kaj enciklopedio. Se la ideo sukcesus estus metodo por ŝpari laboron!

La laboro en la telefonado kaj leterskribado ne estis granda kompare kun la malfacilaĵoj kiujn mi renkontus se mi penus fosi palistruojn en la ŝtona tero de Pensilvanio. Tion mi sciis.

Mi lernis ke en la densejo tie en Aŭstralio kreskas certa specio de arbo sufiĉe rekta, mallonga kaj senbranĉa. Mi rezonis ke ili kreskus en la saman astronomian direkton, kiu estas la direkto kontraŭ la kutima direkto de plantkreskado en nia parto de la mondo. Kaj mi pravus! Eĉ kiam ili estis ankoraŭ nur plantidoj ĉirkaŭ mia domo mi rimarkis ĝoje ke la radiketoj etendis en la aero kaj la trunkoj kreskis suben en la grundon!! Tion mi tuj raportis al la Aŭstraliaj perantoj de kiuj mi mendis la semojn de tiuj arboj.

Je la ĝusta tempo kiam la trunkoj havis la grandecon de la palisaj stangoj, mi tranĉis ilin. Turistoj aĉetis la radikojn altpreze ĉar mi vendis ilin kiel pecoj de flosligno trovitajn en la sablo de la marbordo; kaj oni uzis ilin kiel artobjektoj kaj por fari lampojn.

Poste, ĉar mi ne havis la forton por eltiri ilin, mi drilis truetojn en la trunkoj kaj enverŝis mian kampanan alkoholtrinkaĵon ("lunbrilaĵo") kaj bruligis ilin! Do, mi ne devis fosi truojn: mi nur enmetis la palisojn en la truojn kaj komencis konstrui barilon.

Sed mi faris malgrandan eraron en la procedo: la tergloba kontraŭa punkto de mia domo ne estas en Aŭstralio ĝuste, sed en la maro. Do, la arbetoj kreskante en la kutima maniero ne kreskis ĉi tie perpendiklaj, sed oblikvaj.

Vizitantoj ofte demandas al mi, "Kial via palisaro kliniĝas?" Tamen, mi ne ofte respondas per la vera rakonto, kiun mi ĵus rakontis al vi, ĉar ekzistas urbanoj kiuj ne kredus ĝin. Mi simple respondas ke granda vento klinis ĝin. Mi malĝojegas ke mi devas tiel diri, ĉar oni devus paroli vere.

* * * * *

MENSA

Ekzistas societo unika, limigita al tiel-diritaj inteligentuloj, kiu nomiĝas "Mensa." Oni diras ke la membraro kreskas, kaj asertas ke 20,000 anoj sin trovas en pli ol 60 landoj; sed ili ne celas inkluzivi la tutan homaron, ĉar la kvalifiko por membreco estas inteligento-kvociendo pli alta ol tiu de 98% da homoj.

Ĉi tiu grupo provizas eksperimenton en la esplorado de psikologio kaj socioscienco, ĉar la devoj de ĉiu ano estas: 1. pagi sian kotizon, 2. permesi uzon de sia nomo en presita listo, kaj 3. respondi al konfidenca poŝtaj enketoj. Ĝi estas fonto de voluntuloj por veraj esploristoj kiuj bezonas studi altinteligentan grupon.

Kiel UEA, ĉi tiu organizo estas neŭtrala rilate al politiko, religio, raso, ktp.; kaj havas heterogenan karakteron. Estas membroj en ĉiuj aĝgrupoj kaj en multaj okupoj, ekzemple, astronomoj, fabrikistoj, fervojistoj, instruistoj, komercistoj, kuracistoj, poŝtistoj, policistoj, presistoj, redaktoroj, sciencistoj, studentoj, kaj verkistoj.

Oni esperas lerni ion per la enketoj pri la solvo de sociaj problemoj, ĉar "Mensa" petas gravajn opiniojn de siaj membroj pri sociaj demandoj. Inter fundamentaj konsideroj estas: kie en la kresko kaj ŝanĝo de publika opinio taŭgas la ideoj de la alt-inteligenta persono? Ĉu la socio tiel bone kiel eble utilas la (t.d.) inteligentulojn? Ĉu ili povas havi formigan influon je publika opinio, aŭ antaŭvidi tion?

Special-interes-grupoj ekzistas en la organizo, ekzemple, "Esper-menso," kiu estas asocio de la anoj kiuj interesiĝas pri Esperanto. Ili ne-oficiale proponas la ideon de kunlaboro inter UEA kaj "Mensa." Kiu ajn pripensas la ideon ne devas forgesi ke "Mensa" estas, kiel UEA, internacia grupo, kiu eldonas ne nur gazeton, sed la nomojn kaj adresojn de ĉiuj anoj, kaj ankaŭ en multa kazoj donas detalojn pri siaj okupoj kaj interesoj.

La prezidanto de "Esper-menso" estas Philip W. Trubey, 827 Thorndale Drive, Ottawa 10, Canada. La sekretario estas Harry J. Lewis, Box 1322, North P.O., Halifax, N.S., Canada.

* * * * *

LA KASTELO GRESILLON

Robert J. Milligan

Lastatempe mi pasigis dek agrablajn tagojn ĉe la Kastelo Gresillon, fame konata kulturdomo en Francujo. Esperantistoj el diversaj landoj ĉeestis prelegojn, vidis filmojn kaj lumbildojn kaj parolis inter si la Internacian Lingvon. Ni partoprenis diversajn ekskursojn, piknikis kaj diskutis aferojn kaj seriozajn kaj bagatelajn. Sed la Kulturdomo Gresillon estas ne nur kunvenejo, kien vojaĝas vizitantoj el multaj landoj: ĝi

estas unika eksperimento...eble la plej sukcesa eksperimento tia en Esperantujo.

De post la jaro 1952 (ĝis 1965; redaktoroj) pli ol 6000 Esperantistoj el tridek landoj vizitis la Kastelon Gresillon; la plimulto estis Eŭropanoj, sed ĉeestis ankaŭ Azianoj, Nov-Zelandanoj, Usonanoj, Brazilanoj, Afrikanoj, k.t.p. Ĉiu Esperantisto portas kun si hejmen bonegan memoron pri la komuna kunvivado, kaj impresojn ne forgeseblajn pri la atingeblecoj de Nia Lingvo.

Ne estas hazarde, ke tia Kulturdomo sin trovas en la provinco Anjou. La historio de Francujo kronikas, ke la Princoj de Anjou regis multajn landojn el Eŭropo, kaj ke Anjou tre fruepoke altiris eminentulojn el eksterlando. Do, la Kastelo Gresillon iel heredis la tradician rolon de l'provinco Anjou: la gastigejo de multlandaj homoj.

Oni povas nur mallonge priskribi la aktivecojn ĉe Gresillon, kiuj inkluzivis prelegojn de Profesoro Setala el Finnlando kaj Profesoro Bormann el Germanujo; oni multe lernis, multe ankaŭ vidis kaj trafis geamikojn. Oni neniel sentu devigon ĉeesti la kursojn kaj prelegojn: oni povas sunbaniĝi, naĝi, fiŝkapti, aŭ promeni ĉien admirante la belan pejzaĝon.

Tiuj, kiuj havas bonan apetiton ĝuas la manĝon ĉe Gresillon... jen Franca manĝo bonege kuirita kaj rapide formanĝebla! Kontraŭ malgranda elspezo oni havas la ŝancon praktiki Esperanton ĉe vere internacia Esperanto-Domo, kien iras homoj de bona volo el landoj proksimaj kaj malproksimaj. (Laŭvorte el "The British Esperantist," numero 717.)

* * * * *

LA KATO

Iu familio laŭkutime iris aŭtomobile sabaton matene al memserva vendejo por aĉetadi. La patro kondukis kaj kvankam li estis bona kondukanto, akcidento okazis survoje. La aŭtomobilo frapis katon. La patro haltigis la veturilon kaj li kaj la du gefiletoj eliris. La kato kuŝis sur la grundo kaj la infanoj ekploris dirante "Ni devas helpi la katon". Sed la patro respondis "Ni ne povas ĉar ĝi estas mortinta." Tiam la infanoj kriegis "Ni devas enterigi ĝin, Paĉjo. Ĉu vi permesas tion." La patro konsentis kaj akceptis la respondecon de la afero. Li levis la korpeton kaj metis ĝin en la ŝarĝujon de la aŭto kaj, ĉar li ne disponis sakon, li uzis ĵurnalpaperon por volvi la kadavreton.

Post ne longe, la familio alvenis ĉe la vendejo kaj aĉetis multon. Antaŭ ol ili forlasis la magazenon, la patro petis kaj ricevis ekstran sakon por la kato.

Ili revenis al la aŭto kie la patro unue metis la katon en la ekstran sakon kaj tiam metis la sakon flanke sur la grundon por restigi ĝin dum li metis la aliajn pakaĵojn en la ŝarĝejon.

Malhonesta virino vidis la sakon sur la grundo kaj pensante ke ĝi estas valora, ŝi decidis ŝteli ĝin. Ŝi rapidis al la pakaĵo, ekprenis ĝin, kaj forkuris. Sed la familio vidis ŝin kurantan kaj decidis ke estus interese sekvi ŝin. Ili postiris ŝin al parketo kie ŝi haltis kaj sidiĝis sur benko, kaj komencis manĝi lunĉon. Subite ŝi memoris pri la pakaĵo kaj scivolis kion ĝi enhavas. Ŝi metis manon en la sakon kaj palpante ion strangan, ŝi enrigardis; tiam ŝi subite ŝirkris kaj pro eksitiĝo ŝi renvertis la benkon, falis kaj frapis la kapon kontraŭ la grundo. Ŝi senkonsiĝis kaj baldaŭ grupo da personoj amasiĝis ĉirkaŭ ŝin. Iu telefonis por venigi ambulancan kiu baldaŭ alvenis.

Du servistoj, blanke vestitaj, metis ŝin en la aŭtomobilon. Tiam unu el la rigardantoj rimarkis la sakon, prenis ĝin, kaj donis ĝin al unu el la servistoj, dirante, "Tio apartenas al la virino". La blanke vestita viro metis la sakon kun la paciento kaj la ambulanco rapidis al hospitalo.

POR STUDANTOJ

LA ELEFANTO

La elefanto estas la plej granda surtera mamulo en la mondo. Ĝi povas esti ĝis dek tri futojn alta kaj povas pezi ok tunojn. Ĝi ankaŭ havas grandegan fortecon.

Tamen, la elefanto ne estas bela besto. La grandaj, dikaj kruroj subtenas rigidan korpon kovritan de dika griza haŭto; kaj la okuloj estas malgrandaj kompare kun la granda kapo.

La parto plej interesa estas la rosto, kiu vere estas longa nazo kiun la besto uzas diversmaniere. Ĝi uzas ĝin por spiri, kaj por trinki (por fari tion, ĝi enspiras akvon kaj tiam ŝpruĉas la akvon el la rostro en la buŝon). Kiam la vetero estas varmega, la elefanto malvarmigas sin per ŝpruĉado el la rostro al la dorso. Por tiri, levi, aŭ porti ion, ĝi volvas la rostron ĉirkaŭ la objekto.

Du dentegoj etendas el la buŝo, kaj ĉiu povas pezi pli ol cent funtojn. Elefantaj dentegoj provizas la plej bona fonto de eburo; kaj por havigi ĝin, ĉasistoj jam ekstermis la plimulton de la elefantaroj en Afriko.

Krom la dentegoj, estas kvar mueldentoj en la buŝo; kaj dum ili eluziĝas, novaj dentoj kreskas por anstataŭi ilin.

Elefantoj havas ordinaran aŭdpovon, kaj ili ne havas bonan vidpovon, sed siaj flarsento estas eksterordinara. Kiam la vento ĝuste direktiĝas, elefanto povas sensi homon kiu estas du mejlojn for.

Estas du ĝeneralaj specioj de elefantoj: la afrika elefanto kaj la hinda aŭ azia elefanto. Ambaŭ loĝas en tropikaj arbaroj kaj estas membroj de elefantaroj kiuj konstante vagas por serĉi nutraĵon. Ordinare ili estas pacemaj kaj atakas nur kiam ili estas timigitaj aŭ vunditaj aŭ por defendi siajn idojn. La afrika specio troviĝas en Afriko, sude de la Saharo, kaj ili manĝas ŝelon de arbaroj, kaj maĉas branĉojn kaj radikojn por forsuĉi la sukcon, forkraĉante la pulpon. La azia elefanto loĝas en Hindujo kaj en sudorienta Azio. Ĝi manĝas herbon, foliojn, bambuajn plantetojn, fruktojn, branĉetojn, kaj la molan ŝelon de iuj certaj arboj.

La ĉefaj malsamecoj de la du specioj estas ke la afrikaj elefantoj estas pli grandaj ol la hindaj, kaj havas multe pli grandajn orelojn.

La viva longeco por elefantoj similas tion de homoj. Elefanto estas maljuna kiam ĝi estas sepdek jara, kaj post tiam ĝi ne vivas longe.

Oni multe uzas la aziajn elefantojn por labori. Ili levas kaj tiras pezajn ŝarĝojn, kiel ligno. Oni ankaŭ uzas ilin en la ĉasado. La afrikaj elefantoj ne estas ofte malsovaĝigitaj sed ekzistas lernejo en la Kongo kiu sukcese dresas ilin.

La malsovaĝigita elefanto estas fidela besto kaj estas danka pro afableco, sed ĝi estas venĝema pri ofendoj.

Estas malnova rakonto pri elefanto en urbo de Hindujo: Ĉiutage kiam la besto pasis antaŭ la butikoj de tajloroj, ĉi tiu viro donis al ĝi ion por manĝi.

Sed iun tagon la tajloro estis malbonhumora kaj, anstataŭ la manĝeton, li donis al ĝi pikon ĉe la rostro per kudrilo.

La elefanto tiam iris al puto, kirlis la akvon per siaj piedoj ĝis li miksis koton al la akvo. Li plenigis la rostron el la miksaĵo kaj reiris al la butikoj kie ĝi ŝpruĉis la tajloron kaj la komercaĵon tiel ke ĝi difektis ĉiujn varojn.